# nia voĉo

**madrida esperanto-liceo decembro 2020**

## ZAMENHOFA TAGO 2020

En 2020 la tradicia Zamenhofa Tago devos fariĝi malpli tradicia. Ĝi devos okazi virtuale, pro la malhelpoj devigitaj de la sanitara situacio.

Madrida Esperanto-Liceo pretigas nun alispecan celebradon, virtualan. La nuna plano estas ĝin okazigi la **sabaton la 12an de decembro** inter 11:30-14:00. Fakte, ĝi komenciĝos je la 12 horo, la unua duonhoro estos malferma, por ricevi la partoprenontojn. Ĝi okazos per la servo ***Jitsi***. La konkretan adreson kaj aliajn detalojn ni diskonigos per la kutimaj komunikiloj kaj per EventaServo.org; bonvolu atenti tion.

Rilate al la enhavo, post bonveno de MEL, ni havos etajn programerojn (maksimume po 15 minutoj). La programo estas ankoraŭ malferma, do se vi deziras iel kontribui, bv kontakti kun MEL ĉe madrid@esperanto.es, ĝis vendrede decembro la 11a je la 12:00 matene.

En decembro ne okazos do la kutima unuasabata renkontiĝo, kiu estos anstataŭata de la celebrado de la Zamenhof-Tago.

## MIGUEL FERNÁNDEZ x 2

La pasintan 13an de novembro la programo “Olvida tu equipaje”, de la madrida Radio Utopía, gvidata de la poeto Armando Silles McLaney, estis tute dediĉita al prezento de la hispanlingva poemaro “Semilla de arrebol” de Miguel Fernández, konsistigata de antologio, en lia hispanigo, de poemoj el liaj tri ĝis nun publikigitaj E-poemaroj. En la programo, kvankam hispanlingva, Esperanto grave rolis, kiel endas. La pria podkasto rete alireblas ĉe:

https://www.ivoox.com/13-11-20-semilla-arrebol-palabras-mayores-miguel-audios-mp3_rf_60737816_1.html (aŭ pere de: http://www.radioutopia.org.es/olvida-tu-equipaje/)



VK 2020: Aŭtora Momento kun Miguel Fernández

Aliflanke, pasintjulie UEA proponis al Miguel Fernández sendi videaĵon pri sia poeta laboro por ĝia publikigo kadre de “Aŭtora Momento” en la Virtuala Kongreso. La videaĵo aperis tiukadre, sed meze de novembro, UEA alŝutis ĝin Jutuben kiel memstaran filmeton, ĉe: https://www.youtube.com/watch?v=rt1u8rFaxog.

## JORGE CAMACHO ANKAŬ HISPANE

Ankaŭ Jorge Camacho publikigis antaŭnelonge hispanlingvan poemaron, kun la titolo “Quemadura” (Brulvundo), enhavantan ĉiujn liajn poemojn escepte de tiuj aperintaj en 2018 en la hispanlingva “Palestina estrangulada” (Palestino strangolata). En “Quemadura” legeblas dek poemoj en Esperanto originale verkitaj kune kun la traduko en la hispanan.


La libron eldonis la madrida eldonejo Ediciones Vitruvio, en kies retpaĝo ĝi estas aĉetebla.

madrida esperanto-liceo

Rodríguez San Pedro 13-3º-7. 28015 Madrid

http://www.esperanto.es/mel/ madrid@esperanto.es

Redaktas Toño del Barrio Komentojn kaj informojn sendu al niavocho@gmail.com




En la jutuba kanalo de la eldonejo oni povas spekti la unuan prezentadon. Jen la ligilo (en la hispana lingvo): https://www.youtube.com/watch?v=YsqDI89ze7o.

Informoj pri la libro, kun aludoj al Esperanto, aperis ankaŭ en la retpaĝo: https://www.fronterad.com/balsamos-y-quemaduras/. Jorge estis intervjuata ankaŭ la mardon 17an de novembro en la programo Mundo Noticias de Carlos Peñaloza en Radio Inter.


## RETLISTO DE MADRIDAJ ESPERANTISTOJ

Estis anoncite ke la servo de retlistoj de Yahoo fermiĝos la 15an de decembro. Oni do malfermis novan retliston por madridaj esperantistoj ĉe Guglo-grupoj.

Vizitu ĝin en la retadreso: https://groups.google.com/g/esperanto_madride/. Ĉiu ajn esperantisto, ne nur madrida, povas aliĝi al ĝi vizitante tiun adreson, aŭ sendante mesaĝon al la adreso: esperanto_madride+subscribe@googlegroups.com.

En la venontaj tagoj iom post iom oni transirigos la aktivadon al tiu nova adreso. Oni eventuale invitos la antikvajn membrojn de la ĝisnuna listo, sed ĉiu esperantisto rajtas aliĝi al ĝi.

## PMEG EN LA SIDEJO




Estis eldonita nova versio en papero de la Plena Manlibro de Esperanta Gramatiko, de Bertilo Wennergren. HEF aĉetis ekzemplerojn por disvendi. La prezo estas kutime 40 €, sed ĝis la Zamenhof-Tago (kiu estas ankaŭ Tago de la Libro en Esperanto) oni proponos rabaton, kaj la prezo estos 35 €.

Ankaŭ la libroj de la stoko de MEL havos **specialan rabaton de 10%** dum tiu ĉi periodo.

Principe oni ne sendos ilin, sed transdonos fizike, ĉu en la sidejo aŭ aliloke en la urbo Madrido. Interesatoj, bv skribi al libro@esperanto.es, aŭ telefonu al Manolo Parra.

## POR PLIAJ INFORMOJ

La sidejo provizore plu malfermiĝas dum la lundaj vesperoj, kaze ke vi deziras fari iun ajn demarŝon aŭ rendevui kun la tie deĵorantaj respondeculoj, sed memoru ke kunvenoj estis nuligitaj kaj ni daŭre petas ke vi anoncu vin kaj vi prenu la normalajn antaŭzorgojn

Por informiĝi pri daŭraj agadoj virtualaj, vizitu la retejon https://eventaservo.org/.

Por aliaj novaĵoj en Madrido, vizitu regule la retejon de MEL http://www.esperanto.es/mel, kaj la retliston http://es.groups.yahoo.com/group/esperanto_madride/ (nur ĝis la 15a de decembro!) aŭ la nova https://groups.google.com/g/esperanto_madride/.

En *Fejsbuko* vizitindas la forumo de MEL: https://www.facebook.com/esperanto.madrid/ aŭ la pli ĝenerala https://www.facebook.com/groups/esperanto.madrid/. Alia ebleco troviĝas en *Meetup*: http://www.meetup.com/Madrid-Esperanto-Conoce-aprende-practica-y-disfruta.